

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1997:5

SEF på mässa



Esperantoförbundets monter på "Skolforum" har utformats av Calle Pettersson.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Oktober 1997 • 85-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck AB, Stockholm

Prenumeration 1997: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1997:

Direktansluten medlem 170 kr.
Famijlmedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 24/12

Manus till La Espero

sänds till Jan Setréus
Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden
fax 08-7177567

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

ĈEFARTIKOLO

Ekspozicio "Skol-Forum"

"Mia onklo lernis esperanton..."

Dum kvar tagoj fine de oktobro okazis denove la granda ekspozicio "Skol-Forum" por instruistoj. Tridek mil vizitantoj venis. Multaj el ili vidis nian budon, kiun ornamis nia membro Carl Pettersson el Norrköping - profesia pri tiaspeca reklamo.

Estis nia tria partopreno en tia evento, kaj ni denove povis informi al scivolemaj homoj kaj transdoni materialon al aliaj kiuj ne kaptis la okazon demandi. Ĉi-foje ni disdonis lingvan superrigardon sur ses paĝoj. Miaj helpantoj kaj mi disdonis 1250 ekzemplerojn, kaj estos interese vidi kiom el tiuj instruistoj poste kontaktos nin rekte al Esperanto-centro aŭ la klubojn. Pro statistikaj kaŭzoj, inter alie, mi petas vin, reprezentantoj de niaj kluboj, informi al mi se iu kontaktos vin kiel sekvo de la vizito en Skol-Forum.

Mi mem deĵoris la tutan tempon, kaj nia ALU-dungito Michael Pellryd estis tre kontenta ŝanĝi laborlokon el EC al nia budo en Älvsjö. Mi estas certa ke kelkaj prenis la etenditan informilon en lia mano pro lia ĉarma rideto. La du aliaj helpantoj, kiuj dutage helpis, estis

Bengt Jonsson kaj Bengt Nordlöf. Lastan tagon venis Wim Posthuma el Västerås por helpi nin.

Estis rimarkinde multaj el la instruistoj kun kiuj ni iom interparolis, kiuj menciis ke ili havas iun parencon kiu okupiĝas pri esperanto. Plejofte temis pri onkloj aŭ onkloinoj, patro aŭ avo - kelkfoje oni menciis pri iu kolego.

Estas evidente ke tiu ĉi ekspozicio ĝuas prestiĝon. Inaŭgure parolis ĉefministro Göran Persson, iam antaŭe lerneja ministro.

Apud nia budo troviĝis la budo de JÄM-O, la ŝtata institucio pri egaleco inter la seksoj. Mi havis okazon paroli kun du el iliaj deĵorantoj, kaj mi atentigis ke esperanto vere estas lingvo, kiu kondukos al lingva egaleco inter ĉiuj homoj de la mondo.

Ne nur venis vizitantoj el Svedio, sed ankaŭ el eksterlando. Mi parolis kun juna virino el Lisbono, kiu nenion sciis pri esperanto. Post kelkaj minutoj ŝi demandis kiel trovi esperantistojn en sia hejmurbo. Mi montris al ŝi la jarlibron, kaj ŝi notis adreson...

Dankon al helpantoj.

Roland Lindblom

Fira jul - nyår
i esperantomiljö!

Detaljerad information
per telefon 0590-30909

Esperanto-Gården
Lesjöfors

La seminario "La Kultura Lingvo" en Lesjöfors

Jen denove Esperantistaro renkontiĝis en sia novo domo en Lesjöfors. Tie, kie ni sentas nin esti hejme. Okazis pro renkontiĝo de Sveda Esperanto-Instituto, okazinta inter la 20-a kaj 21-a de septembro 1997.

La unuan tagon, do vendredon, estis iom neformalaj programoj. Enloĝigo de partoprenantoj kaj kun intimaj interparoladoj inter ĉeestantoj ĉe la manĝotablo, aŭ apud taso da kafo kun bongustaj kukoj.

La vera programo komencis sabate per malfermo de la seminario kun salutprelego de la prezidanto de la instituto Bo Sandelin, kiu prezentis prelegon-tajn dum la seminario, kaj kiu bonvenigis ilin. Temis pri pli ol 86 partoprenantoj el diversaj partoj de Svedio, sed ankaŭ el eksterlando, kiel el Britio, Danlando, Germanio, Finnlando, Pollando, Ruslando, Zimbabvo, Japanio, Ĉinujo. Afablajn vortojn de bonveno ni aŭdis ankaŭ de Märtha Andreasson kaj aliaj.

Nia leksiko

La unua preleganto dum la seminario estis Erich-Dieter Krause el Germanio kun prelego sub titolo "Ĉu Esperanto devas pliriĝi sian vortprovizon?" Per sia interesa kaj altvalora prelego, li prezentis al ni multajn lingvajn kaj vortajn problemojn, kiuj aperas dum la uzado kaj disvastigo de Esperanto. Per sia prelego li klarigis ke Esperanto estas kaj devas esti viva lingvo, kiun oni uzas kaj parolas, do kiu vivas kaj evoluas same kiel aliaj vivaj lingvoj, kun apero kaj akcepto de novaj vortoj kiuj riĝigas la vortprovizon en Esperanto. Tio estas la fakto, kiun oni devas akcepti. Sed li klarigis ke oni ne devas akcepti arte-fari la ŝanĝon de vortoj kiujn Esperanto jam akceptis, kaj kiujn Esperantistoj jam uzas. Kial, demandas li, fari konfuzojn, kiel ekzemple pri vorto "puto" kaj "putino". Ni scias la signifon de la ĝis nun uzata vorto "puto", kiu signifas truan por havigi akvon el la tero. Do, ne estas akceptebla iu nova signifo de la vorto "puto". Estas certe kelkaj Esperantistoj kiuj deziras enmeti al Esperanto kelkajn siajn naciajn vortojn. Sed, oni ne devas larĝigi vortprovizon por kiu ajn prezo, kaj speciale ne instigi ŝanĝi jam de longe uzatajn vortojn, por anstataŭigi ilin per aliaj, kiuj pli taŭgas al iu nacia lingvo. Esperanto estas internacia lingvo, kaj ĝi devas resti tia. Ne larĝigu Esperanto-vortaroon por kiu ajn prezo, kaj speciale ne ruinigante tion kion oni jam akceptis dum pli ol 100-jara ekzisto de Esperanto.

Post la prelego, venis amuza punkto kun kantado akompanata de gitaro, kiu prezentis al ni la juna Esperantistino Nina el Ruslando, kiu ĉarme kantis sian kanton "Urbo de mia infaneco".

El la historio kaj pri surduloj

Post la abunda kaj bongusta lunĉo venis interesa prelego de konata Esperanto-poetino Dr-ino Marjorie Boulton el Britio, kiu prelegis sub titolo "La proceso, la sorĉistino kaj ŝia kato". Elĉerpinte el historio kaj ĝia evoluo amason da dokumentaj veraj rakontoj pri la sufero de maljunulinoj dum jarcentoj en multaj tiel nomataj altkulturaj landoj, kiel en Hispanio, Francio, Skandinavio, kaj ankaŭ aliaj eŭropaj landoj. Kiam oni kruele turmentis senkulpajn maljunulinojn, nur ĉar iu supozis ke ili kulpis pro apero de iu malsano, morto, malsukcesa rikolto k.t.p., eble nur ĉar ili posedis iun nigran katon, aŭ iu rimarkis ke la maljunulino parolis al sia hundo, al sia kato aŭ simile. Tio kaŭzis kruelajn turmentojn al tiu virino kaj ŝian mortigon, aŭ forbruligon. La prelegistino devis ege multe legi, kaj kolekti amason da faktoj pri la temo pri kiu ŝi parolis, por prezenti al ni tiel altnivelan kaj valoran prelegon.

Post la agraba interparolado, dum iu nova paŭzo, parolis Aira Kankkunen pri siaj spertoj de lernigo de surdaj infanoj por komenci lerni, kaj kontakti kun la ekstera mondo, en la prelego sub titolo "Malfermiĝo de lingvopordoj por surdaj infanoj". Ŝia grandega, respondeca kaj malfacila laboro kiun ŝi faris kiel volontulino kun surdaj infanoj en Finnlando.

Kulturo kaj Bona Espero

Post la vespera manĝo venis vespera programo en la muzeo de Lesjöfors, en nekutima medio, inter produktoj de iama fero-fabrika, inter grandegaj feraj radoj kaj malnovaj maŝinoj, la reprezentanto de la muzeo rakontis iom pri ĝia historio, de la tempo kiam en la sama ejo laboris ĉ. 100 laboristoj, por produkti produktojn kiujn oni eksportis al aliaj landoj, kaj kompreneble, ankaŭ uzis en Svedio. Iom nekutima medio, en kiu ni havis okazon vidi la prezentadon de teatraĵo-monologo "Jubileo" pri la evoluo kaj vivo de Esperanto dum ĝia

centjara vivo kaj ekzisto, kiun tre sperante, kapable kaj vere altarte prezentis Jerzy Fornal el Pollando, kun asistado de la edzino Zofia Fornalova. Estis tre longa teatraĵo, por kiu Jerzy devis uzi vere grandan tempon kaj spertojn por prezenti ĝin.

Andrea Forman, juna Esoperantistino, kantis al ni kun akompano de sia gitaro. Ŝi ankaŭ prezentis al ni belegajn kaj tre interesajn diapozitivojn de sia 6-monata restado en Bona Espero, nekutima Esperanta help-bieno en Brazilo, kiun dum 20 jaroj sindone gvidas aktivaj Esperantistoj Giuseppe Grattapaglia (iam el Italio), kaj lia edzino Ursula Grattapaglia (el Germanio). Temas pri bieno, kiun la geedzoj Grattapaglia konstruis kaj fondis, por helpi al sengepatraj, aŭ tre malriĉaj infanoj, por lernigi ilin en propra lernejo, instrui ilin fari diversajn laborojn, metiojn k.t.p., kaj samtempe lernigi ilin Esperanton. Estas vere treege malfacila la sindona laboro de geedzoj Grattapaglia, des pli ĉar tiun helpo-laboron ili faris plejparte per propraj fortoj, sen helpoj kiuj estus tiel bezonataj al ili.

Sten Johansson faris prezentadon de novelo "Dufoja ekspono" de Renate Livia Schneider, pri kortuŝa historio de adoptita knabino el Rumanio.

Roland Linblom legis poemon "Akvativ-maŝino" de novzelandano poeto.

Dr-ino Marjorie Boulton legis siajn 3 amuzajn poemojn "Soka helpu min", "Timema vojaĝanto" kaj "Poemo pri Boŝko kaj Amira", kaj fine "Kontenta kato", kion la publiko per aplaŭdo dan-kesprimis.

Sekvis interesa filmo pri Lesjöfors, pri ĝiaj naturaj belecoj vintre kaj somere, kaj pri la malgaja historio de industrio en tiu urbeto, kiu kolapsis kaj multaj entreprenoj iris al bankroto, kaj laboristoj restis senlaboraj, aŭ devis serĉi aliajn laborojn en aliaj partoj de la lando.

La vespero finiĝis per nova kafo-servado kun bongustaj kukoj, kiujn faris la dommastrino de Esperanto-Gården, Ros-Mari.

Leksiko kaj sindonemulo

Dimanĉon, tuj post la matenmanĝo, en la programo ni denove vidis gravan kaj kapablan Esperantistinon-poetinion Marjorie Boulton kun ŝia prelego "Prepozicioj petolas, korelativoj kapriolas". Ŝi prezentis diversajn amuzaĵojn de produktado de novaj Esperanto-vortoj. Tiel, ŝi unu fojon aŭdis iun diri ke azeno havas kapon ataŭe, kaj malkapon malantaŭe, kio igis aŭskultantojn ridi.

Zofia Fornalova parolis pri grava pola aktivisto-kuracisto D-ro Korĉak, kiu multe helpis al infanoj dum malkapaj tagoj de faŝista teroro en Pollando, kiu ege helpis orfajn infanojn, skribis librojn por ili, kaj kiam faŝistoj venis por preni tiujn infanojn al koncentrejo Treblinka, li mem volonte kuniris, ne dezirante lasi ilin, kvankam li sciis ke li iras al certa morto kun siaj 200 senkulpaj infanoj.

INFORME

La poŝtgira numero de Esperanto-Gården (por donacemuloj), kiun oni ne trovis en la ekstra numero de *La Espero*, estas 444 02 45 - 1

Post la kafo-paŭzo sekvis nova prelego de Erich-Dieter Krause "La evoluo de la leksiko de Esperanto". Prelego kun amaso da faktoj prezentitaj al ĉeestantoj.

Plej aktiva kaj tre sperta Esperanto-instruisto Lars Forsman parolis pri "Novaĵoj de ILEI de la kursoj en Karlskoga, novaj instruiloj kaj bezono eduki novajn Esperantoinstruistojn".

Lia alia temo estis "La estonteco de Esperanto-Gården" kaj pri ĝia estonteco, speciale kiel fari ĝin bona kursejo.

Post la kafo/kuko-servado estis finita la programo, kun amika "Ĝis revido". Do, Esperanto-Gården estos ĉiam pli kaj pli uzota, ĉiam pli alloga, kaj kolektiĝos malnovaj kaj novaj Esperantistoj.

Estu tiel! Vivu kaj progresu Esperanto!

Vera Persson, Leksand

Esperanto leds av f.d. minister

Internationella esperantoforbundets årskongress hölls i år i Adelaide, under en vecka i juli. Kongressens lokala kommitté leddes av Australiens förbundsordförande Keppel Enderby (tidigare justitieminister). Enderby började lära sig esperanto 1985 och har sedan engagerat sig mer och mer. Han har nyss pensionerat sig, men har fortfarande utredningsuppdrag för parlamentet.

Australien anses ju ligga lite avsides varför UEA-styrelsen budgeterade antalet deltagare till högst 1000. Det genomsnittliga antalet deltagare i årskongresserna ligger på 2400. Budgeten höll måttet – det blev över 1200 deltagare.

Universitetsföreläsningar

är en traditionell företeelse under kongresserna. Varje år utses en rektor som deltar i förberedelserna och som sedan inleder varje föreläsning med presentation av föreläsaren.

Årets rektor, ekonomiprofessor Ronald C. Gates, är nu pensionerad sedan tio år från en tjänst som universitetsrektor. Han har även varit engagerad i Australiens samarbete med UNESCO.

För att göra något intressant och trevligt efter sin pensionering började Gates att studera in esperanto. Det gick så bra att han så småningom började författa en samling noveller och sedan tre detektivromaner.

Professor Alan Bishop

från Melbourne började med esperanto så sent som 1993, men hans fru kunde redan tidigare. Intresset för esperanto som första främmande språk i skolan har lett till att man låtit över 200 skolbarn studera esperanto, och nu följer man upp detta vid det universitet som Alan Bishop har sin verksamhet i. Liknande undersökningar har gjorts bl.a. i Finland och Tyskland, och det har visat sig ge goda effekter. Så goda att man sparat in all den tid man lagt ned på esperantoundervisningen med råde.

Australiens mångåriga diplomat Ralph Harry

har varit mycket aktiv inom esperantorörelsen i många många år. Han var under en tid Australiens FN-delegat. Sitt arbete som ambassadör i olika länder har han dokumenterat på ett mycket trevligt och skämtsamt sätt, genom

att skriva en liten bok om en mängd episoder ur sina glada minnen som diplomat. Boken finns naturligtvis på esperanto.

Både Ralph Harry och den tidigare nämnde Alan Bishop höll föreläsningar under kongressveckan.

Kongressens beskyddare

var Generalguvernör William Deane. För att hedra kongressen och dess deltagare fanns en "hederskommitté" som bestod av flera ministrar och parlamentets talman samt några kända professorer.

Svenska deltagare

Det tar lång tid att resa från Sverige till Australien, och det kostar en hel del. Kongressdeltagare bekostar själva sin resa och uppehåll. Tjugo svenskar kostade på sig att delta. Bland dem professor Christer Kiselman, Uppsala. Han ingår nämligen i Esperanto-Akademien.

Roland Lindblom

NEKROLOGOJ

Svea Westerdahl

La 21-an de majo forpasis Svea Westerdahl. Kvankam ŝi estis 86-jara kaj unu el niaj plej maljunaj membroj, ŝi preskaŭ ĝis la komenco de la nuna jaro ankaŭ estis unu el niaj plej aktivaj membroj. Ŝi regule vizitis niajn klubkunvenojn kaj ĉiusemajne partoprenis nian konversacian studrondon. Ŝin interesis ĉio. Krom pri Esperanto ŝi ĝis la fino interesis sin pri dancado de svedaj popoldancoj, kaj jam 80-jara ŝi eĉ ekzameniĝis pri ŝipkondukado.

Ni kiuj havis la favoron regule renkonti la etan kaj preskaŭ nekredible viglan Svea neniam forgesos ŝin.

(El Kelklinie pri... 1997:5)

Runo Stridell

Runo Stridell, Garpenberg, kies biografio okaze de lia 95:a naskiĝtago, aperis en n-ro 4 de *La Espero*, kviete forpasis la 26-an de oktobro.

Aktiva esperantisto de post 1930 li gvidis plurajn kursojn kaj entuziasmiĝis multajn homojn lerni kaj uzi esperanton.

Por honori lian memoron estas eble donaci monsumon je lia nomo al Esperanto-Gården, poŝtgira konto 444 02 45 - 1.

Esbjörn kaj Kaj Stridell

Prenumerationer

Esperantoforbundet erbjuder medlemmarna att prenumerera på esperantotidningar för 1998. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 - 5 SEF Specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel. 0415 - 501 52

Tidning	nr/år	pris (kr)
El Popola Ĉinio	12	265
Esperanta Finnlando	6	115
Esperanto	11	250
Esperanto-Dokumentoj	10	200
Esperanto en Danio	5	115
Eventoj	23	285
Eventoj (flyg)	23	335
Fonto	12	230
Heroldo	16	230
ICEM	4	130
Informoj de EA Estonio	4	70
Juna Amiko*	4	85
Kontakto	6	150
Kulturaj Kajeroj	4	105
La Jaro	1	47
La Jaro (flyg)	1	64
La Kancerkliniko	5	165
La Ondo de Esperanto	12	165
Lingvaj Problemoj kaj Lingvoplanado		250
Literatura Foiro	6	220
Litova Stelo	6	85
Monato	12	335
Monato (flyg)	12	385
Norvega Esperantisto	6	85
Oomoto	2	75
ret-Ventoj**		175
Rok'Gazet***		130
TEJO tutmonde	4	80

* Rabatter vid mer än 2 ex

** 2-3 ggr/vecka (Förutom din vanliga adress måste du även meddela din e-postadress)

*** Fyra nr, inte för ett år

Esperanto-teatro

En Lesjöfors

Okaze de la esperanto-seminario en Lesjöfors en la 20a de septembro 1997 prezentis Jerzy Fornal "La Jubileo"-on, novan teatraĵon verkitan de Zofia Banet-Fornalowa kaj Harold Brown. En la daŭro de 45 minutoj "La Jubileo" prezentas superrigardon de la unuaj cent jaroj de la Esperanto-teatro. Dum tiuj cent jaroj aktoroj, reĝisoroj, verkistoj kaj teatro-amantoj (profesiaj kaj amatoraj) dediĉis siajn talentojn al la surscenigo de la dramo en esperanto. La dramarto, kampo ne tre konata de esperantistoj, konsistigas gravan parton de la kulturo en la esperanto-lingvo. Sur la scenejo la diverstenta Jerzy Fornal aperigis personojn kiel Adela Schäfer (kiu prezentis la faman Hamletan monologon dum la unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar) Richard Schwarz, Nikolai Rytjkov, Julio Baghy kaj dekuon da aliaj, neforgesante la plej novan sur la scenejo, Fraŭlinon Barlastono. Krom esti teatraĵo "La Jubileo" estas dokumenta prezento de grava parto de la historio de Esperanto kaj jam estas prezentita 15 fojojn diverslande.

En Gdansk

Tiuj kiuj trovis sin en Gdansk en 24a de septembro 1997 por partopreni la Gdankan Esperanto-Kongreson ankaŭ feliĉis spekti imponegan kaj aŭtoritatan prezenton de "Aniaro" de Harry Martinson laŭ la majstra traduko de William Auld kaj Bertil Nilsson, tre lerte aranĝitan por unu aktoro de Gunnar Gällmo. La originala verko estas grand-skala sed la kompilaĵo de Gunnar Gällmo permesas nin kapti la esencon de la tuta en pli malpli duono da horo. Jerzy Fornal dediĉis siajn talentojn al tiu vastskala verko kaj tiuj kiuj spektis lian prezenton en Gdansk neniam forgesos ĝin. Silento regis inter la spektantaro dum iom da tempo post la prezento finiĝis, tiel forte emociigita estis la prezento. Se vi iam ricevos ŝancon rigardi Jerzy Fornal en tiu rolo ne maltrafu tion.

Tekstoj

La tekstoj de "La jubileo" kaj la aranĝo de "Aniaro" fare de Gunnar Gällmo haveblas de Harold Brown, Box 142, 579 23, Högsby. Kostoj: "La Jubileo" 30 kronoj plus afranko. "Aniaro" 30 kronoj plus afranko.

Harold Brown

Unua libro pri la eŭro en Esperanto

Nova mono aperis en Eŭropo post nur 15 monatoj. En nur tri jaroj la eŭro anstataŭigos plurajn el la nunaj monoj de la Eŭropa Unio kaj baldaŭ poste ankaŭ tiujn de aliaj landoj.

Pri la historio de la eŭropa monunuigo kaj ĝiaj pluaj paŝoj, la ecoj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la eŭro, la leĝaj kaj praktikaj aspektoj, la enkondukaj kostoj, kaj problemoj por privataj kompanioj, aperis nova libro. Ĝin originale verkis projektgvidanto pri enkonduko de la eŭro en granda belga asekura kompanio. La enhavo estas aktuala ĝis la lasta momento, en septembro 1997. La libron ilustras la eŭrobiletaj kaj -moneroj, la eŭrosimboloj kaj pluraj tabeloj.

Eksciu ĉion pri la mono kiu baldaŭ estos la plej grava en la mondo, aĉetante ĉi tiun libron ĉe la eldonejo, ĉe UEA aŭ ĉe via kutima libroservo.

"Eŭro, ecoj kaj sekvoj por ĉiuj", 52 p. (ilustritaj), eldonejo: FEL/Esperanto 2000, Rulenslaan 10, B-3020 Herent (Winksele), UEAkonto ekik-v. Prezo ĉe la eldonejo: 7,95 NLG, rabato 1/3 ekde kvin ekzempleroj; plus sendokostoj (minimume 2,00 NLG).

Rezolucio de la Komitato de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

La esperantistoj el la landoj de Eŭropa Unio, kunvenintaj en Stutgarto en la 3a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso de la 16a ĝis la 19a de majo 1997,

konsciente

- ke la eŭropaj popoloj, post multaj sangaj konfliktoj kaj milionoj da viktimoj, aliris post la dua mondmilito la vojon al paca kunvivado interne de komunaj demokratiaj institucioj;
- ke Eŭropa Unio konsistigas la konkretan provon kune konstrui tiajn instituciojn;
- ke la estonteco de la paco kaj de la prospero de la Eŭropaj popoloj estas nepre ligita al la sukceso de tiu provo;

kaj konsciente krome

- ke la Eŭropa kontinento estas la mondparto kie la lingva problemo havas plej grandan gravecon kaj plej fortan urĝecon;
- ke la manko de demokrata solvo al la problemo de rekta interhoma komunikado inter la eŭropaj civitanoj konsistigas grandegan malhelpon al la progreso de la Eŭropa konstruado;

deklaras

- ke diverseco de kulturoj, ideoj kaj lingvoj estas ja granda riĉaĵo, sed nur kondiĉe ke ĝiu estu akompanata de bazaj komunaj principoj de respekto al la fundamentaj homaj rajtoj kaj de fakta ebleco de egalrajta interkomunikado;
- ke la lernado de la internacia planlingvo Esperanto, sekvata de laŭebla lernado de unu aŭ pluraj etnaj lingvoj, estas la plej taŭga vojo por atingi egalrajtan komunikadon kune kun pli profunda reciproka kono;

atentigas

la instancojn de Eŭropa Unio, la naciajn registarojn kaj la publikan opinion pri la ebleco, kiun la Esperanto-movado proponas laŭ la manifesto de la Esperanto-Movado prezentita en Prago en julio 1996;

konfidas

al Eŭropa Esperanto-Unio la taskon reprezenti la Esperanto-Movadon antaŭ la instancoj de Eŭropa Unio, prezenti al ili la eblecojn de "planlingvo" kaj ĉiel kunlabori kun ili cele al atingo de pli bona interkomunikado inter la Eŭropanoj.

Jerzy Fornal rolas en "Aniaro"



Stuttgart, la 18-an de majo 1997

La antipoda kongreso

"Toleremo kaj justeco en multkultura socio"

estis la temo por la 82-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu dum semajno okazis en la sudaŭstralia urbo Adelaido ĉi tiun someron. Estis en multe tradicia kongreso, sed samtempe diferenca de aliaj. I.a. estis la unua kongreso de esperanto okazinta en tiu parto de la mondo. Malgraŭ longa vojaĝo proksimume 1.200 homoj kolektiĝis kaj ĝuis la diversajn programerojn, kiuj ĉiuj okazis en la bela Kongrescentro de la urbo.

Estis tagoj plenaj de aktivecoj kaj vesperoj kun diversaj spektakloj, koncertoj, prezentado de folklorajfoj k.t.p.

Unu el la ĝojaj aferoj dum kongreso estas denove renkonti geamikojn kaj pasigi kelkajn horojn aŭ minutojn kun ili. Oni ofte hazarde renkontiĝas survoje al aranĝo kaj nur havas tempon saluti kaj ĉirkaŭbrakumi.

Kiel ordinare estis neeble sekvi ĉiujn programerojn, tial mi mallonge mencias iom pri tiuj, kiujn mi ĉeestis. Pri la laboro de Komitato kaj la pli oficialaj aranĝoj vi povos legi en Esperanto aŭ Heroldo.

Mediaj problemoj en Aŭstralio

La inaŭgura ceremonio dimanĉe okazis preskaŭ laŭ modelo de aliaj kongresoj. Eble estis iom malpli da diplomattoj ol ordinare. Kaj la reprezentantoj de la landaj asocioj ne sidis sur la podio dum la tuta inaŭgura ceremonio, sed sur la unuaj vicoj da seĝoj en la salono. Tio ŝajne estis bona ŝanĝiĝo. Sur la podio nun estis nur la estraro kaj kelkaj lokaj reprezentantoj.

Posttagmeze mi aŭskultis treege interesan prelegon pri la mediaj problemoj en Aŭstralio. Ĝia faŭno kaj flaŭro estis tre unika, sed post la alveno de la angloj multe estis detruita. La aborigenoj respektis la naturon, sed la blankuloj ne. Bestoj kaj plantoj, kiujn ili kunportis el Eŭropo ne estis bonaj por la lando. La grundo detruigis kaj multo da humo estis forblovita. Oni ankaŭ forhakis la plej grandan parton de la pluvarbaroj, ankaŭ en lokoj, kie ne konvenas terkulturi. La rezulto estas terura, ĉar poste kreskas nur malbona herbo kaj diversaj arbustoj.

Manglarboj estas necezaj por la fiŝoj, ili ja kreskas en la akvo tie. Sed la akvo pli kaj pli estas for. Eŭropaj insektoj envenis la landon kaj ili estas pli

atakemaj ol la indiĝenaj. La eŭropanoj ankaŭ enplantis diversajn bestojn, ekz. katojn, hundojn, kuniklojn kaj eĉ lupojn. Tiuj lastaj mortigis pingvenojn kaj multajn malgrandajn kanguruojn, same kiel faris la katoj. Eĉ bufojn oni importis por manĝigi ilin per insektoj en la sukerkanaj kampoj. Sed la bufoj havas venenon, kiu mortigas la indiĝenajn bestojn. Ankaŭ rilate enplantitajn arbojn estis same, la indiĝenaj arboj estis forpremitaj de la novaj kaj la novaj ne estis bona manĝaĵo por la indiĝenaj bestoj k.t.p.

Toleremo, justeco kaj multkultura socio

Aliaj interesaj kunvenoj estis tiuj, kiuj traktis la kongresan temon. En la unua sesio estis 7 diversaj personoj, kiuj prezentis la temon el sia landa vidpunkto kaj enkondukis la diskuton inter la partoprenantoj pri ĝi. Oni volis montri kiel bone aŭ malbone funkcias toleremo kaj justeco en iliaj hejmlandoj, kie vivas diversaj homgrupoj flanko ĉe flanko. Temis pri Aŭstralio, Bosnio, Sudkoreo, Belgio, Israelo kaj Indonezio/Orient-Timoro. Ĉio tre interesa, sed por ni tamen la unua "raporto" estis plej interesa kaj mi iom mencias pri ĝi, ĉar ĝi ja temis pri nia gastiganta kongreslando Aŭstralio.

En tiu paro estis duonaborigena virino, kiu rakontis pri afero, kiu okazis, kiam ŝi havis kvin jarojn. Ŝi nun estas proksimume 40-45-jaraĝa.

Dum la unuaj jaroj, kiam venis la blankuloj al Aŭstralio kaj okupis ĝin - ili ja "trovis novan landon, neloĝatan" - la aborigenoj estis traktataj preskaŭ kiel sovaĝaj bestoj, kiuj tute ne havis iajn rajtojn. Nur en 1967 ili ricevis homajn rajtojn en sia propra lando. Ili eĉ ne havis rajton al siaj propraj infanoj. Ofte okazis, pro la manko de blankulinoj, ke la viroj "uzis" aborigenajn virinojn kaj se la sekvo estis infano, tiu infano ricevis iom pli blankan haŭton ol la veraj indiĝenoj. Povas esti ke la konscienco de la viroj vekigis, kiam ili vidis sian pli helhaŭtan idaron vivi kun la aborigenoj en mizeraj cirkonstancoj en la primitivaj loĝejoj. Eble ili iom hontis, ĉar oni decidis, ke oni devas "savi" la infanojn. Do, ili per helpo de policistoj, forrabis la infanojn de la gepatroj kaj metis ilin en infanan institucion kaj neniam plu ili rajtis viziti siajn patrinojn aŭ gepatrojn, eĉ ne ekscii pri sia deveno.

La virino rakontis pri okazintaĵo en sia infanaĝo, kiam venis policistoj al ŝia

hejmo por kunporti ŝin for de ŝia patrino. Sed pro diversaj kaŭzoj la patrino jam antaŭe eksciis pri la policista vizito kaj la knabineto devis malsupreniri en truon en la tero, kiun oni antaŭe preparis ĝuste pro tia okazaĵo. Ĉar oni ne trovis ŝin ili iris for kaj tiu knabino feliĉe sukcesis resti ĉe sia patrino, dum multaj aliaj ne havis saman bonŝancon.

En aliaj prelegoj pri la aborigenoj ni eksciis pri ilia nuna vivo kaj la rebato, kiu estas direkta al ili por limigi la rajton de la aborigenoj al grundo, kiu estas por ili sankta grundo. Ni eklernis pri ilia kulturo - dancoj, muziko kaj manlaboroj - sed ankaŭ pri ilia bonega scio uzi ĉion en la naturo por vivteni sin kaj trovi medikamentojn. Fakte ili povis uzi ĉion en la naturo. Estis la virinoj, kiuj havis la taskon kolekti radikojn kaj alian uzeblan, dum la viroj ĉasis kaj protektis la familion. Ili loĝis en la lando dum proksimume 40.000 - 50.000 jaroj kaj la kontinento do ne estis senhoma, kiam venis la Kapitano Cook kaj "prenis" la "neloĝatan" landon kaj alligis ĝin al la Brita Imperio.

Nun estas en Aŭstralio vera batalo por ke la aborigenoj ne rehavu tro da grundo, malgraŭ ke ili, laŭ subskribita kontrakto havas rajton pri grundo, speciale tiu, kiu por ili estas sankta. Almenaŭ ili volas havi liberan alirrajton al tiuj lokoj. Sed la farmistoj timas, ke la aborigenoj forĉasos ilin de iliaj hejmo.

La dua kaj konkluda kunsido pri la kongresa temo

Unue la prezidanto de LKK, Keppel Enderby, raportis pri la situacio en Aŭstralio rilate la aborigenojn kontraŭ la "blankuloj".

Trevor Steele, verkisto kaj instruisto, kiu 1-2 jarojn vivis kune kun aborigenoj, gvidis la kunsidon. Li i.a. rakontis pri la forkonduko de la infanoj de la propra familio de la duonaborigenoj. Ankaŭ pri "La blanka-Aŭstralio" - politiko, kiun la lando praktikis dum sufiĉe multe da jaroj. La socio tute ŝanĝiĝis post la dua mondmilito pro la multaj enmigrintoj. En 1973 la malnova politiko estis for pri "blanka Aŭstralio" kaj pli multkultura socio kreskis.

Li ankaŭ parolis pri "la paradizo por laboristoj", kiu nun vaporigis, ĉar la merkato regas. Kiel nun estas pri politika justeco kaj toleremo en la nova multkultura socio? Kiel devas roli la esperantistoj en ĉi tio?

Maria Belosević el Kroatio rakontis

pri rajtoj por kroatoj eksterlande, loĝas diversaj en Italio, Aŭstrio, Hungario kaj aliloke. Ekzistas problemoj, kelkfoje praktikaj, kelkfoje teoriaj.

Daniele el Italio rakontis, ke ankaŭ en Italio estas rasismo, momente eĉ tre forta, speciale kontraŭ la afrikanoj, kiuj nun venas pli kaj pli. Ekzistas multaj antaŭjuĝoj rilate la afrikanojn.

Kian konkludon ni faru post la du sesioj de prelegoj kaj diskutoj? Ni diskutis la raporton, kiun la prezidanto faros al La Komitato pri la kunsidoj, poste la estraro de UEA rekomendu daŭrigan laboron laŭ la kongrestemaj linioj.

Adelaido – la kongresa urbo

Dum multaj aliaj lokoj en Aŭstralio unue estis loĝataj de krimuloj aŭ aliaj por Britio malplaĉaj personoj – oni ja uzis la kontinenton kiel punkolonion – Adelaido neniam estis loko por homoj, punitaj en Britio, sed estis fondita de liberaj homoj, kiuj volis fondi al si paradizon. Oni komencis konstrui ĝin en 1836 kaj tiam la rivero Torres estis grava por la komerco.

Nun pli ol unu miliono loĝas tie, se oni enkalkulas la antaŭurbojn preskaŭ duonmiliono pli. Tion kaj multe alian ni eksciis dum la rondveturado en la urbo. En la botanika ĝardeno ni konatiĝis kun multaj kreskaĵoj, ĝis nun tute fremdaj por ni. Ankaŭ ni eksciis kiel la aborigenoj vivis kaj uzis la diversajn kreskaĵojn. La promenado finiĝis per vizito en restoracio, kie ni gustumis kanguruan kaj strutan viandon kaj aŭskultis "dideriduan" muzikiston, tre spertan. Li rakontis kiel fari la muzikilon kaj kiel uzi ĝin. Ĝi estas farita el kava arbotrunko kaj li rakontis ke daŭros multajn jarojn antaŭ ol la knaboj, elektitaj jam tre junaj, fariĝos bonaj "dideriduisoj".

Semajno de internacia amikeco – SIA

SIA estis iniciato de Eric Carlén iam en la 1950-aj jaroj. Komence ĝi havis grandan sukceson, ankaŭ inter neesperantistoj.

UEA opinias, ke nuntempe, kiam la internacia amikeco estas tiel grava, ni provu relanĉi la ideon pri tutmonda semajno de internacia amikeco. Oni komisiis al S-ino Edvige Tantin Ackermann, Via Valerio 110a, IT-341 28 Trieste, Italio, esplori la intereson de la esperantistoj. Ne estis multaj kiuj venis al la kunveno, sed la ĉeestantoj ŝatis la ideon kaj decidis, ke daŭre la lasta tute plena semajno en februaro ĉiujare estu "Semajno de Internacia Amikeco". UEA reverkis broŝureton, ĉar la malnova estis iom malmalmoderna. Petu ĝin.

La semajno povos esti festata diversmaniere, ĉiu klubo aŭ asocio mem decidu. Edvige Ackermann konsilis al ni ne fari tro grandajn aranĝojn, almenaŭ ne komence, sufiĉas atenti ĝin, eble inviti rifuĝanton aŭ alian eksterlandanon rakonti pri sia hejmlando, skribi salu-

tojn, sendi donaceton aŭ simile. La plej grava komenco estas, ke la ideo pri SIA estu vivanta. Iom post iom oni aranĝu pli prestiĝajn projektojn. Ekstis en la kunveno pluraj bonegaj ideoj.

Tamen grave estas, ke oni raportos al E. Ackermann, kion la klubo faris. Estas bone, ke iu kolektas la ideojn, tiel ke oni iom post iom rimarkos, ke vere okazas io samtempe en diversaj partoj de la mondo.

Unikaĵo – fakkundsido de SAT en UEA-kongreso

Alia aranĝo kiun mi partoprenis, estis kunsido de SAT. Estis la unua fojo SAT-kunsido okazis en UEA-kongreso. La kunsidon iniciatis japano, Yamasaki Seikō el Tokio. Tion menciis la prezidanto de la kunsido, Perrot, kiam li bonvensalutis la aron da ĉeestantoj, inter 25 kaj 30 personoj.

Poste kelkaj aliaj parolis. Marcovics i.a. menciis, ke la estonteco de SAT estas malfacila, la homoj ne plu volas nomi sin laboristoj kaj la laborista movado estas malfortigita. Gilbert René Ledon el Brazilo diris, ke la situacio por la laborista movado ne ŝanĝiĝis de 1921, kiam fondiĝis SAT, nek rilate senlaborecon nek rilate salajrojn kaj aliajn aferojn.

La prezidanto de LKK, Keppel Enderby, en sia parolado i.a. diris, ke li estas iom kontraŭ la statutoj de SAT. Por progresigo necezas pli modernaj statutoj. Ekz. en la nunaj nenio estas menciita pri medio, virina agado kaj pluraj aliaj aferoj. Estas en Aŭstralio malfacile persvadi sindikatistojn uzi esperanton, eble ĉar la sindikata movado en si mem nun estas pli malforta, li diris. Ekzistas nur 15 SAT-membroj en Aŭstralio, li diris kaj samtempe admonis la ĉeestantojn anonci sin ĉe li, se iu volas membriĝi.

La brazilano Ledon opiniis, ke baldaŭ ni ne havos laboristan klason. Li sin oponis kontraŭ la eldiro, ke SAT ne pripensis la medion. Male, preskaŭ dekomence la organizo "Naturamikoj" laboris kaj i.a. eldonis propran gazeton.

Persono (la nomon mi ne kaptis) kiu respondecas pri la esperantoelsendoj en Vieno ankaŭ havis vidpunktojn. Li opiniis, ke la batalo de la laboristoj devas esti, ke oni defendu la rajtojn, kiujn oni ricevis post multjara solidara batalo. Tom Elliot, Aŭstralio, atentigis pri la ekologio, ke ĝi ne estas bone evoluita pro ekonomiaj kaŭzoj. Tio ŝajne pardonigas ĉion. Pri SAT li diris, ke ĝi faris mirindan taskon el morala vidpunkto en ekologiaj aferoj. Blary, Francio, surpriziĝis, ke povis okazi SAT-kunsido en UEA-kongreso kaj esperis, ke nun ankaŭ povos okazi UEA-kunsido en la SAT-kongreso.

Ankaŭ la direktoro de la UEA-oficejo en Roterdamo, Osmo Buller, vizitis la kunsidon kaj parolis pri la rilatoj inter UEA kaj SAT, i.a. li menciis, ke li mem estas SAT-ano kaj ke oni en la "Kam-

panjo 2000" celas pli intimajn kontaktojn kun SAT, i.a. por presi la novan eldonon de PIV.

Ekskursoj – antaŭ kaj dum la kongrestagoj

Unu semajnon antaŭ la kongreso mi partoprenis grupvojaĝon al diversaj urboj kaj interesaj lokoj ĉirkaŭe en Aŭstralio. Ni vizitis konatajn turistlokojn kiel La Grandan Rifon ekster Cairns, Ayers Rock (aŭ Uluru, kiu nun estas la oficiala nomo, ĉar apartenas al la aborigenoj) meze en la dezerto en la Norda Teritorio, ambaŭ treege kaj neforgesoble belaj kaj interesaj. Ni flugis al Alice Springs de kie ni veturis per la malnova fervojo "The Ghan" al Adelaido. Ni vizitis Sidnejon dum unu tago - ni faris rondveturon aŭtobuse en la urbo kaj ŝipe en la haveno. Tie la plej fama vidaĵo estis la operejo de Sidnejo. Unu tagon post la kongreso ni flugis al la Kangurua Insulo kun espero vidi sovaĝajn kanguruojn kaj aliajn bestojn, sed la insula nomo estis erariga, ni vidis nur 2-3 kanguruojn en nacia parko kaj same tie kelkajn koalojn. Pli multajn ni vidis en zoologia ĝardeno en Cairns. Ĉe la maro ni vidis marleonojn kaj eĉ promenis inter ili, sed cetera la insulo estis grandparte terkulturejo kun paŝtigitaj ŝafoj kaj bovinoj en la arbustaj herbejoj kaj kampoj.

Unu el la unuaj tagoj en Cairns, kie estis pli varme ol en la suda Adelaido, ni faris ekskurson al la vilaĝo Kuranda, kiu situas tre alte en la montaro. Tien ni "grimpis" per malnova etŝpura fervojo, sed reen al Cairns ni veturis per tri kaj duonan km longa ŝnurfervojo alte super la plugarbaro – la plej lasta en Aŭstralio laŭdire. Kuranda vere estas vinda kun multaj interesaj arboj kaj arbustoj kaj amasoj da birdoj, kiuj trilis i.a. dum nia promeno en la plugarbaro.

Finvortoj

Estus multe pli rakonti pri la ekskursoj, pri la kongreso kaj la lando entute, sed mi lasas tion. La raporto jam estas tro longa. Sed io grava mankas en miaj surfacaj scioj pri Aŭstralio. Temas pri la ĉiutaga vivo por la "blankaj" aŭstralianoj. Oni multe raportis pri la aborigenoj, sed ne multe pri la ĉiutaga vivo por la cetera loĝantaro.

Mi finos per mencio de renkontiĝa memoro. Dum sufiĉe multaj jaroj mi korespondis kun virino, Kay Andersen. Nun finfine ni persone renkontiĝis, ĉe la kongresa informbudo, kie Kay deĵoris, helpante la kongresanojn diversmaniere. Tio ankaŭ estas grava bildo de kongreso - la renkontiĝo inter homoj, la persona kontakto, amikeco inter homoj el diversaj nacioj kaj mondopartoj.

Märtha Andréasson

RÄTTELSE

I nummer 4/97 av *La Espero* kom att stå på s. 5 i artikeln om KELL att man beslutat skänka 10.000 kr till någon från Baltikum. Det riktiga är att det "...beslotts att skänka 10.000 kr till Esperanto-Gården och 5.000 kr till någon från Baltikum...". Red. beklagar det inträffade och hoppas att det inte ska bli fler fel när det gäller så stora summor pengar.

NOVA NUMERO

Håkan Lundberg, estrarano de SEJU, havas novan telefonnumeron: 08 - 717 51 76

Strangaj imagoj

Lernolibro

Antaŭ kelkaj semajnoj mi trovis sufiĉe novan lernolibron pri lingvoscienco: "Språk - vad är det?" de Milan Bily kaj Gertrud Malmberg; Almqvist&Wiksell 1996 ... Troviĝas unu paĝo pri "artefaritaj lingvoj" kaj duonpaĝo pri sekretaj lingvoj...

Nerekte parolata

La difino de "artefarita lingvo" (*konstgjort språk*) estas vere stranga (p. 20 en mia traduko):

"Artefarita lingvo estas lingvo kiun neniu rekte parolas. Ĝi ne estiĝis tra jarcentoj kaj evoluiĝis kune kun homoj, kiel la veraj lingvoj. Artefarita lingvo estas lingvo kreita de iu aŭ iuj."

Kiel oni parolas lingvon "nerekte"? Ĉu Esperanto estas nerekte parolata lingvo? Ĉu la difino ne diras - nerekte - ke artefarita lingvo kiun iu ekparolas fariĝas "natura" lingvo? Supozeble la aŭtoroj intencis diri ke planlingvo estas nenies gepatra lingvo. Sed ja ekzistas t.n. denaskaj Esperantistoj, kiuj lernis Esperanton de frua infanaĝo.

Estas menciite ke Esperanto ankaŭ vivas kaj estas la plej granda inter la artefaritaj lingvoj, ke ekzistas dekoj da revuoj en Esperanto kaj radiodissendoj. (Sed se planlingvo ne estas parolata de iu, kiel eblus radiodissendoj?)

Sen libroj

Pluen en la teksto: "Alia grava diferenco inter artefarita lingvo kaj "vivanta" estas tio ke preskaŭ neniu verkas librojn en artefarita lingvo. Verkistoj preskaŭ ĉiam verkas en siaj gepatraj lingvoj. Miloj da libroj estas verkataj en la angla kaj franca kaj tial estas eble pli bone lerni tian lingvon ol Esperanton".

Jes, kompreneble. La ĉ. 18.000 libroj ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno ne ekzistas, ĉu ne, ankaŭ ne la biblioteko de la germana Esperanto-Asocio en Aalen kun 9.000, kies katalogo estas serĉebla per Interreto? Kaj pri la Internacia PEN-Centro, kiun la Internacia PEN-Asocio akceptis kiel sekcion dum sia jarkunveno en 1993, Bily & Malmberg evidente nenion scias. Kaj tiel plu.

Kompreneble la angla kaj la franca estas, globale, gravaj minoritataj lingvoj en la nuna mondo (konsiderata kiel tuteco), sed tio ne necese senvalorigas Esperanton.

Mizera stato

Mi ne intencas per ĉi tiu teksteto draŝi la aŭtorojn de la libro specife, sed uzi ĝin kiel ekzemplon pri la mizera stato de lingvistiko rilate al scio pri Esperanto.

En lernolibroj pri lingvoscienco oni aŭ ne mencias Esperanton, aŭ fuŝas la aferon; esceptoj estas raraj. Eblas en Svedio, kiel en multaj aliaj landoj, trapasi universitatan edukadon pri lingvoj ĝis kaj preter doktoriĝa nivelo sen ia ajn scio pri Esperanto, pri ĝiaj kvalito kaj esprimovo. Estas gravege ke ekzistu ĝustaj informoj pri Esperanto en la lernejoj, kaj por instruistoj kaj por lernantoj. Tiel ankaŭ tiuj kiuj ne studas Esperanton en la lernejo almenaŭ ne havu strangajn imagojn pri la lingvo.

Christer Lörnemark
(El Interligilo 3:97 p.3-4)

Respondo al NN

Leginte en La Espero 97:4 la mallaŭdan "leteron" de NN mi senprokraste reagis por esence kontraŭdiri la anoniman aŭtoron/verkanton...

Laŭ mia opinio redaktoro/redaktanto S. riĉigas la gazeton, tiel pri la ĝenerala enhavo kiel pri la originalaj kontribuajtoj.

Vere legindaj estas la spacpostulaj artikoloj sub la resuma rubriko Malaperantaj kulturoj, laŭŝajne science ankritaj.

Bonan daŭrigon!

Martin Persson
Orsa

Ĵurnalismo kaj lingvo

La numero 4-1997 de *La Espero* plaĉas al mi. Varia kaj interesa enhavo. Aparte allogas la artikolo pri Sigurd Agrell kaj liaj tradukoj de malnovaj poemoj. La proverba ludo estas malfacila, sed instrua kaj solvebla tasko.


Al la aŭtoro NN mi volas ripeti kion skribas la verkintoj de "Manlibro pri ĵurnalismo", Judith Junger/Stefan Maul: "Esperantistoj foje emas rigardi la lingvon mem, paroladon kaj skribadon de Esperanto, kiel celon kaj ne kiel ilon. Tial oni foje legas publikigaĵojn, en kiu la lingvo estas uzata tiel virtuoze, ke oni devas laboregi por kompreni, pri kio fakte temas. Demonstrado de lingva sperto de aŭtoro ne povas esti la celo de artikolo. En ĵurnaloj kaj revuoj la enhavo estas pli grava ol la lingvo."

Pri la enhavo de la 4-a numero de la ĉi-jara serio de *La Espero* mi estas kontenta. La lingvon en la gazeto mi havas nek kapablon nek emon prijuĝi.

Saluton kaj bonan sukceson al la redakcio.

Lennart Persson

Anna-Lena



Mi estas **Anna-Lena Eriksson**, la prezidanto de SEJU. Mi venas de Sundsvall, loĝis dum kelka tempo en Usono kaj en Stokholmo, sed restadas de post preskaŭ tri jaroj en Umeå. Sekve mi estas la plej norde loĝanta en la estraro. Same kiel 22.000 el miaj samurbanoj mi studas ĉe la universitato. En junio venontjare mi ekzameniĝos kaj post tio mi eklaboros kiel kuracisto. Tiam estos mi kiu devos scii, kiel kuraci malsanulojn. Iom nervoziga penso fakte. Troviĝas ja tiom multaj diversaj malsanoj kaj medikamentoj... Nu ja, certe aranĝiĝos ankaŭ por mi.

Ĉi tiun aŭtunon mi dediĉas multegan libertempon al nia studenta farso My Lady. Mi aperos sur scenejo kiel... ne, tio ankoraŭ restu sekreto. Mi tre ŝatas aktori, kaj antaŭe mi membris ankaŭ en improvizteatra grupo, sed decidis paŭzi pri tio ĝis post My Lady. Restas tamen ankoraŭ iom da libertempo kaj mi ĝin plenigas per sportado, umado kun miaj geamikoj kaj ho, mi preskaŭ forgesis, esperanto!

Esperanton mi lernis kiel 15-jarulo en 1987 ĉar la ideo pri lingva egaleco plaĉis al mi. En 1990 mi ekkomprenis, ke esperanto ne nur estas bela ideo kaj facila lingvo sed ankaŭ bona rimedo por amuziĝado, ĉar tiam mi partoprenis KEF 3 en Västerås. Mi aktivis en SEJU jam kelkajn jarojn kaj tre entuziasmas pri KEF, nia plej granda projekto de post IJK en 1991.

La Ĥmuoj

La Ĥmuoj estas popolo bruligkultura^o en Laoso kaj Vjetnamio. Ili loĝas ĉefe en Laoso, sed ekde la 19-a jarcento, kiam ili amase migris, ankaŭ en la najbara lando Vjetnamio, proksime al la norda duono de la komuna landlimo.

Laŭ Dang Nghiem Van (La Ĥmuanoj, en Etnografiaj Donitaĵoj, Fremd-lingva Eldonejo, Hanojo, 1974, p. 226-296) ili nombras 18.000 homojn en Vjetnamio kaj ĉ. 300.000 en Laoso.

Bruligkulturstoj

La Ĥmuoj loĝas montare. La bruligkulturstoj de la Ĥmuoj signifas "duon-nomadismon", oni bruligas la teron de iu kampo kaj kultivas ĝin. Pro la elsuĉado de nutraj substancoj el la tero, oni poste devas kultivi alian kampon, ne la saman.

La proksima taj-popolo kultivas rizon en la valoj. Rizkultivado postulas multe da akvo, kaj laŭ proverbo Ĥmua "la Ĥmuoj sin nutras per fajro, kaj la taj-oj per akvo".

Pro la ĉiama translokigado de la kampoj la Ĥmuoj ankaŭ transloĝiĝis, sed ne nepre, ĉar ankaŭ eblis promeni la pli kaj pli longajn distancojn al la kampoj aŭ konstrui kabanojn ĉe la kampoj uzatajn dum la kultivado.

Grava laborilo de la Ĥmuoj estas la bastonfosilo. Per ĝi la terkulturisto faras tertruojn por la grajnoj. Ĝi estas farita el bambuo aŭ trunko de arbusto. Kelkfoje la Ĥmuoj fabrikas alispecan bastonfosilon, kvin metrojn longa, kiu funkcias kiel muzikilo. En la bambua tenilo de la bastonfosilo troviĝas la muzikilo, kiu eksonas kiam la terkulturisto gvidanta vicon da laborantoj prisemas la teron. Post la semado oni lasas la bastonfosilon kun muzikilo sur la kampo en loko rezervita al la spiritoj de la bruligitaj teroj. Nova bastonfosilo estas fabrikata ĉe sekva kampo.

Tradicie la Ĥmuoj estas subuloj de la tajoj, ili nur povis aspiri al duonlibereco. Tiel kiam estis vendata lia tero far de la taj-kampano, ankaŭ la Ĥmuo prilaboranta ĝin estis vendata. Cetere la terkulturisto rajtis tute disponi sian propran rikolton, sed ne produktojn plukitajn, ĉasitajn aŭ faligitajn arbare, se ili ne estis malmulte valoraj.

La spiritoj

La tradicia religio de la Ĥmuoj ne havas plej superan dion, sed el inter la spiritoj unu manifestiĝas kiel la plej potenca kaj timata, la Spirito de la Ĉielo. Ĝi ne

estas ĉiopotenca, sed regas grupon da aliaj spiritoj timataj.

La plej respektinda el la subspiritoj estas la Spirito de la Fulmo. Ĝi iel estas komparebla kun nia ĝermana dio Toro, la dio de la tondro, ne nur pro la kunligo kun la fulmotondro, sed ankaŭ pro la rango de dua dio laŭ graveco. Sed Toro estis granda kiel domo kaj larĝaŝultra kiel roko. La Spirito de la Fulmo ne havas precizajn proporciojn. Ĝi estas blue vestita kaj tenas en la mano hakilon, kiu kompreneble memorigas nin pri la martelo de Toro. La Spirito de la Fulmo estas milita, ankaŭ simile al Toro, komandante la ventojn. Paralela al la fulmotondro kiun kaŭzas la ĉaro de Toro, estas la ventoj kiuj ekblovas kiam la Spirito de la Fulmo sin movas. La pluvo, kondiĉo de terkultivado, ankaŭ dependas de la Spirito de la Fulmo, sed ĝin asistas la Akvaj Pitonoj levantaj la akvon al la ĉielo. Tial gravas obei la kulton de la Akvaj Pitonoj. Laŭ la tradicioj de la Ĥmuoj la Akvaj Pitonoj havis korpojn de serpentoj, sed kun piedoj kaj kokokresto surkape. La Akva Pitono estas la praestaĵo de la drakoj, samtempe infera kaj ĉiela ento, tre grava en orientazi-aj kulturoj.

La parencoj

La teorie perfekta edziĝo estas inter kruckuzoj^o, t.e. ĉikaze ke junulo edziĝas kun la filino de sia patrinflanka onklo.

La vertikalaj linioj de viroj indikas patrolinion^o, t.e. parenceco inter infanoj kaj patro. Tio implicas ke la viroj ĉiam edziĝas kun virinoj de patrolinio unu paŝon pli dekstre.

De sia patro la filo heredas sian familian nomon kaj nutran tabuon. La filino havas la saman familian nomon, sed

ŝi heredas la nutran tabuon de sia patrino. Post edziniĝo ŝi havas la familian nomon kaj nutran tabuon de sia edzo, ŝi ja ne rajtas edziniĝi kun fraŭlo de la sama familia nomo aŭ sama nutra tabuo.


Tamen la familia nomo ne fundamente identigas parencon, sed estas geografie kondiĉita identigilo. Ekzemple la unuaj infanoj de vidvinoj loĝantaj kun patroflanka onklo retenas la familian nomon de sia mortinta patro, sed loĝantaj kun la nova duonpatro ili ankaŭ alprenas lian familian nomon.

La Ĥmu-familioj derivas siajn nomojn de vivaj estaĵoj, bestoj aŭ plantoj. La bestoj povas esti mamuloj kiel tigroj, vulpoj, cervoj, simioj, ursoj, sciuroj, lutroj, serpentoj, manisoj k.t.p., kaj ankaŭ birdoj kiel tukanoj, paruoj, alcionoj, hirundoj, najtingaloj, akvoraloj, milvoj k.t.p. Unu familio havas la nomon Kaĝeto de Suĉporkido. La besto kiu donis sian nomon al la familia grupo reprezentas ilian komunan prapatron. Oni ne manĝas viandon de tiu besto.

Ĉar la Ĥmuoj dependas de la tajoj, ilin ankaŭ influas la taja lingvo. Sekve ili havas ne nur sian Ĥmuan familinomon, sed ankaŭ familian nomon de taja origino.

La personan nomon la knabo ricevas de siaj patrinflankaj avo aŭ onklo, do de la patrolinio de estonta edzino. Kiam la patrinflanka onklo mortis, la junulo tradicie heredis havaĵojn de li. Li gvidas la funebran ceremonion, sed nur ŝajne. Nuntempe estas la unuanaskita filo de la mortinto, la estonta families-tro, kiu fakte gvidas ĝin. Tamen la patrinflanka onklo havas kaj devojn kaj rajtojn specifajn rilate al siaj fratinaĵ genevoj.

Jan Setréus



||
[
to
of

estas simbolo de geedzeco
estas simbolo de gefrateco
estas simbolo de viro
estas simbolo de virino

Interparolo en la Fruktĝardeno la 5-an de Aŭgusto

de Igor Newerly, trad. el la pola en esperanto de Zofia Banet-Fornalowa, 1997. Eldonita de la tradukistino kaj havebla ĉe UEA (kaj FEL) ankaŭ rekte de la tradukistino ĉe: ul. Bliska 12, Raszyn, 05-090 Pollando. Prezo 10,50 guldenoj.

Tiuj kiuj travivis, aŭ simple rigardas kun malfermitaj okuloj, la eventojn de nia jarcento, devas foje demandi sin kien malaperis la homa bonvolo, la homa kapablo kunsenti, por ne paroli pri la homa racieco. Eble oni sentas ke iom post iom, kontraŭ la propra volo, la cinikismo enradikiĝas en la karakteron, kaj oni komencas scivoli kiamaniere la homa bonvolo entute eblas. Por tiuj kiuj dividas tiun sperton, (ĉu ne la plej multo de ni?), "Interparolo en la frukt-

ĝardeno la 5-an de aŭgusto" provizas konvinkan ateston pri la malo.

Igor Newerly (1903-1987) estas unu el la plej alte taksataj el la polaj verkistoj. Li ricevis multajn naciajn kaj internaciajn honoraĵojn.

Lia libro "Interparolo en la fruktĝardeno la 5-an de aŭgusto" verkita forme de dokumenta romano rakontas pri la vivo kaj laboro de JANUSZ KORCZAK (1878-1942) (vera nomo Henryk Goldszmit) la pola kuracisto, verkisto kaj edukisto kies nomo estas konata al multaj pro la cirkonstancoj ĉirkaŭ lia morto. Ni scias, kiel li, povante sin savi, akompanis la infanojn de sia orfejo al gasejo en Treblinka kaj pereis kune kun ili, gasumita en la murd-koncentrejo en la 5-a de aŭgusto 1942. La libro tamen

ne okupiĝas pri lia heroo morto sed pri lia vivo kaj laboro. Li speciale interesis sin pri la edukado de infanoj kaj dediĉis la vivon al tio. Li alfrontis la plej gravan kaj malfacilan problemon en la pedagogio kiel eduki infanojn krei ordigitan kaj funkciantan socion sen la uzo de puno aŭ la minaco pri puno. Malgraŭ aĉaj materiaj kondiĉoj li kreis en sia orfejo "respublikon de infanoj" kiu plejparte gvidis sin mem, per juĝoj fare de la infanoj mem. Oni klarigis, ne kondamnis. La celo estis ebligi infanojn fariĝi valoraj homoj, ne produkti bone dresitajn simiojn. La valoro kiu gvidis lian laboron estis precize tiuj humanistaj valoroj kiuj estas bezonataj se la socio ne degeneru ĝis tiu grado ke la plej fortaj sentas sin liberaj trakti la malpli fortajn kiel aĵojn. Li celis instrui ne pri kiel fariĝi eksperto pri la matematiko sed kiel vivi kiel homo inter homoj. Pli gravan celon ol tiu oni ne povas imagi por nia aktuala mondo. Li strebadis atingi tiun celon dum la tuta vivo kaj ne hezitis eĉ dum tiuj jaroj kiam la nazia antisemitismo atingis lian orfejon kaj devigis translokigon al la varsovia geto.

Recenzo ne estas la loko por detala priskribo de liaj pedagogiaj metodoj kaj teorioj. Tiujn oni trovas en la libro. Tio kio frapas min post legado estas ke dum hodiaŭ, nia socio koncentriĝas al la produktado de junuloj kiuj kompetentas pri komputiloj kaj la informteknologio, klare evidentiĝas ke ĝi ankoraŭ ne tiel sukcesis pri la instruado de tio kion Korczak celis - la humanisma sinteno kiu rekonas ke ĉiu homo posedas valoron simple pro tio ke li/ŝi estas homa. Sen tio, lerteco pri la tekniko, la komerco k.s. facile fariĝas danĝero pli ol helpo. Do la laboro de Korczak estas ankoraŭ same rekte rilata al nia mondo kiel dum lia vivo.

Korczak verkis multe da libroj ne nur pri la pedagogio sed ankaŭ romanojn kaj dramojn. Lia pedagogia laboro gajnis internacian rekonon.

La lastaj paĝoj de la libro enhavas kronikon pri lia vivo kaj laboro. Tralegi tion estas superrigardi la historion de la 20-a jarcento. Li deĵoris kiel soldato en tri militoj, kaj vidis mizeron en la socio.

Mi neniam aŭdis pri la aŭtoro Igor Newerly antaŭ ol mi vidis tiun ĉi libron malgraŭ tio, ke Newerly estas unu el la elstaraj verkistoj en Pollando. Sen Esperanto kaj la traduklaboro de Zofia Banet-Fornalowa ni kiuj loĝas ekster Pollando verŝajne neniam ricevus ŝancon legi tiun ĉi historion kiu memorigas al ni kiom multe la socio perdis se ni ne atentis al la vortoj kaj streboj de homoj kiel Janusz Korczak.

Kontraŭ miaj atendoj la historio rakontita en tiu libro estas plena je optimismo. Mia intereso kaj atento estas tuj kaptita, kaj ĝis la fina vorto tenita de la laboro de Korczak, tiel aktualaj estas liaj ideoj. La libro estas vere rekomendinda.

Jan Milld

Harold Brown

Diversspeca legaĵo

"GAJA LEGANTO per esperanto". Tiel nomiĝas libreto, verkita de P.E. Schwerin kaj eldonita en Aŭstralio. La formato estas A5, paĝnumeroj mankas, sed estas 68-paĝaĵo.

La ideo de "Gaja leganto" estas, laŭ la verkisto "krei gajan helpilon por klubkunvenoj kaj kursoj kaj doni konvenan, amuzan instigilon al legantoj izolaj." La tabelo de enhavo: "Spritaĵoj, Vortludoj, Preseraroj, Anekdotoj, Proverboj, Matematikaĵoj kaj Solvoj."

Temas pri legaĵo, kiu povas esti digestita porcie kaj encerbigita selektite - laŭplaĉe. Same kiel mia propra "Ordbygge" ĝi estas malfacile "etikedebla".

Miaprijuĝe la enhavo estas ĉefe tute malpeza, aliflanke almenaŭ la "matematikaĵoj" postulas multe da cerbumado. Sed ne gravas, oni mem elektas kion kaj en kiu ordo oni preferas legi.

Estas konata fakto ke humuro estas tre diversa en diversaj kulturoj. Do, ne tute surprizige mi trovis ke la plimulto de la "spritaĵoj" estas iom tedaj. Sed kion postuli? La ĉefa tasko tamen estas prezenti mallongajn tekstojn, kiuj prezentas lingvajn ekzercojn.

Krome kelkajn legaĵojn fakte mi trovis kaj pensigaj kaj ekridigaj. Ekzemple "180. Anekdotoj":

"La mondfama angla verkisto G.K. Chesterton per eksperimento konvinkiĝis, ke la efiko de parolataj vortoj ne dependas ĉiam de ilia vera signifo.

Iutage li iris al la foireja placo kaj haltis antaŭ budo de fiŝvendistino. Alprenante tre afablan mienon li dolĉavoĉe alparolis la vendistinon:

- Vi estas substantivo, adjektivo kaj verbo.

Senemocie la virino alrigardis lin.

Nun li plilalutis sian voĉon kaj kolere kriis:

- Vi estas adverbo, prepozicio kaj konjunkcio! Vi estas pronomo!

Pronomo estis tro multe por la vendistino; rapidmane ŝi ekprenis fiŝon, vangfrapis la verkiston per ĝi kaj alvokis policiston.

Proverboj abundas en "Gaja leganto", kaj kelkfoje ili eble kontraŭdiras unu la alian:

La heroo aperas nur, kiam la tigro jam mortis. (Birma proverbo)

Se simio regas, dancu antaŭ ĝi. (Araba proverbo)

Ke mankis numeroj de la paĝoj eble ne gravas, pli gravas ke la numeroj de la solvoj de nek la preseraroj, nek la matematikaĵoj estas korektaj.

Sume mi povas - depende de la prezo (kiun mi en la skriba momento ne konas) kaj la enhavo de via monujo (kiun mi ankaŭ ne konas) - rekomendi al vi akiri ekzempleron de "Gaja leganto".

GAJA LEGANTO
PER
ESPERANTO II
de P.E. Schwerin
67 p., broŝurita
ISBN 1 876042 10 9

Eldonita en majo
1997 de Bookleaf
Publishing
Prezo US\$ 6
(Pogranda rabato por
libroservoj, inkl.
sendkostojn: - 33%)
Mendojn sendu al
Donald Broadribb,
59B Lukin St,
Beverly WA 6304,
Aŭstralio,
antaŭpagon al konto
aeal-w de la
libroservo de la
Aŭstralia Esperanto-
Asocio ĉe UEA
(atentigante ke la
pago estas por
Bookleaf Publishing).

ESTONTAJ ARANĜOJ

KEF 98

La redakcio bedaŭras la erarajn datojn en numero 3/97 p. 11 de La Espero! KEF 98 okazos inter la 10-a kaj 16-a de aŭgusto en Lesjöfors.

KEF revenas al Svedio!

"Ne nur konsumi sed aktiviĝi estas la celo! Pro tio ni organizos diversajn tri-tagajn kulturajn uzinojn, en kiuj la partoprenantoj mem aktiviĝas kaj kulturumas. Se al vi plaĉas teatro, muziko, literaturo - jen estas la ŝanco fari ion mem kune kun aliaj."

Uzinoj/kursoj: poeziverkado, teatro-ekzercado, gitarludado, sveda lingvo, komencanta esperanto, prozoverkado, teatra sporto, ĥorkantado, dancado, altnivela esperanto.

Kromaj aktivajoj: biciklado, veturado por drezino, migrado, kanuado, fiŝkaptado.

Kiel veni al Lesjöfors:

De Stokholmo: trajno aŭ aŭtobuso al Kristinehamn, poste aŭtobuso al Lesjöfors.

De Gotenburgo: rekta aŭtobuso al Lesjöfors.

La lundo estos alventago. KEF komenciĝos la 11-an de aŭgusto.

La dimanĉo estos forvetura tago.

Kotizoj (por svedoj):

Kompleta programo:

ĝis 20-jara, 400 kr
20-30-jara, 500 kr
pli ol 30-jara, 600 kr.

Krompago por aliĝo post la 30-a de junio 1998: 100 kr.

Antaŭpago: 100 kr.

Manĝo: Por la tuta tempo, 600 kr (tri manĝojn po tago, ekde lunda vespermanĝo ĝis dimanĉa matenmanĝo)
Memmastrumado eblas.

Loĝado: En junulargastejo: 90 kr nokte.

En amasloĝejo: 25 kr nokte.

Aliĝadreso:

Janko Luin
Myggdalsvägen 123
135 42 Tyresö
retpoŝto: janko@esperanto.se

Antaŭpago al:

Poŝtĝiro 51 33 01 - 2 SEJU
UEA-konto: seju-j
Indiko KEF -98

Programkontribuoj/proponoj de artistoj:

Keiko Snarberg
Briljantg. 12
421 49 Västra Frölunda
retpoŝto: kesn0001@student.gu.se

UK 1998 ĉela Mediteraneo

La 83-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montpellier (Montpeliero) de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998.

La venontjara UK koincidas kun la 100-jariĝo de la Unuiĝo Franca por Esperanto.

"Francio estas internacie famkonata pro siaj variaj pejzaĝoj, sia longa historio, sia kulturo kaj sia kuirarto. Dum viaj ekskursoj antaŭ, dum aŭ post la kongreso vi povos iom sperti la diversecon kaj kulturan riĉecon de la lando, sed unu vizito certe ne sufiĉas por malkovri ĉiujn aspektojn de tuta Francio, eĉ ne tuta Langvedoko - Rusiljono.

Montoj kaj maro, dezertecaj altaĵoj kaj fekundaj ebenaĵoj, sablaj strandoj kaj densaj arbaroj, Langvedoko - Rusiljono prezentas kompletan palettron, kun Montpellier en la centro.

Vi ŝatos kongresi en la koro de histoririĉa urbo, kies moderna kongresejo situas apud agrabla ombra promenejo, tuj ĉe la rando de malnovaj kvartaloj kun ties mallarĝaj stratoj kaj imponaj domegoj, ankaŭ tuj ĉe vigla komerca centro kun multnombraj butikoj vendantaj plej diversajn varojn. Plaĉos al vi sidi ĉe la apudaj terasoj kaj promeni en la friskaj stratetoj. Je kelkaj kilometroj vi estos ĉe la Mediteranea Maro, kie vi trovos larĝajn sablajn strandojn, pitoreskajn havenetojn, ostrobredejojn, aŭ ĉe la montoj, kie ravos vin ŝtonaj vilaĝoj, misteroplenaj kavernoj, kolorplenaj pejzaĝoj. Romiaj restaĵoj, mezepokaj kirkoj, modernaj feriejoj, vastaj vitkampoj, ĉiu trovos turisman celon je sia gusto. Ĉie bonvenigos vin la varma mediteranea suno, kaj la bunta kulturo."

Prospektoj (turisma mapo, malkovraĵoj, tendumejoj, familiaj restadejoj kaj luaĵoj) senpage riceveblaj je simpla peto al:

Comité Régional du Tourisme
Languedoc - Roussillon
20, rue de la République
F-34000 Montpellier, Francio

Telefono: 009 33 467 22 81 00

Fakse: 009 33 467 58 06 10

Retadreso: contact.crtl@cnuse.fr
www.cr-languedocroussillon.fr/
tourisme/

(El Unua Bulteno)

UK 1998

AVGIFTER

Anmälningavgifter (svenska kronor)

	-31/12	1/1-31/3	1/4-
Icke direkta medlemmar i UEA	1080	1350	1620
Direkt medlem i UEA (ej MG)	870	1080	1310
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1/1 1998), som inte är medlem i UEA	655	820	985
Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA	430	540	650

Handikappassistenter och ungdomar födda efter den 31/12 1977 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras uppåt.
Anmälningblanketter för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 94 Hörby
tel. 0415 - 50 152

Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbundet, specialkonto.

Medlemskap i UEA

Du betalar till SEFs specialkonto 14 74 29 - 5 (se ovan) och vi ser till, att din avgift kommer UEA tillhanda. Ange på talongen vad inbetalningen avser och ditt telefonnummer om vi behöver fråga något. Notera noga namn och adress på den betalningen avser.

Vill du fråga något kan du göra det hos:

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 94 Hörby
tel. 0415 - 50 152

Kategori	Avgift (kr)
MA Individua membro kun Jarlibro kaj revuo Esperanto (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto). Bonvolu noti la naskiĝdaton sur la talono.	400
MJ Individua membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj kiel MA)	160
MG Individua membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.	70
SZ Kotizo por Societo Zamenhof, aparta societo por financaj apogantoj de UEA (ne inkluzivas membrecon en UEA)	800
PT Patrono de TEJO ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.	480
DM Pagas por la tuta vivo en unu fojo. Oni ricevas la Jarlibron kaj Esperanto.	10 000
DPat Dumviva Patrono. Pagas unu fojon. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM, kaj estas aŭtomate membro de Societo Zamenhof.	100 000
DPT Dumviva Patrono de TEJO pagas por la tuta vivo en unu fojo. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel PT.	12 000

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

Esperantoforbund, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

NI PREZENTAS

Börje

Börje Andersson, kasisto de SEF.

Naskiĝis en 1924 en Umeå. Ĵurnalisto de gazetoj en Skövde 1943 - 1988. Esperantisto de 1953, sed lernis paroli vere flue la lingvon dank' al 10-jara edziĝtempo kun esperantista hungarino. Li kaj lia Charlott nome uzis nur esperanton kiel familian lingvon.


Post multjara agado en la klubo en Skövde li en 1985 fariĝis SEF-estrarano kiel kasisto. Do nun dum 12 jaroj faris la SEF-kasistadon kaj librotenanadon, helpita de sia Charlott ĝis ŝia morto en februaro 1997.

Trovas precipe la librotenanadon temporaba ("ett svårskött pastorat", laŭ Falstaff Fakir) sed ofte sentas ĝojon pro la laboro. Aspektas ke ne-pre devas esti pensiulo por havi tempon por ĝi.

Vere sentas ke esperanto ĝojigis la vivon: "Edzperanto", multaj amikoj en la tuta mondo, multaj mondkongresoj kaj aliaj travivaĵoj ktp ktp.



KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale


- 1 Nuligis leĝon - Slav'
- 2 Granda akcidento
- 3 Sperta - Enpuŝ' de pinta ilo
- 4 Havas ni ofte plurajn por solvi problemon - Malvigla
- 5 Paron - Lang'
- 6 En tuto - Batalkomenc' - Tio signifas (mallonge)
- 7 Preparita por ne detruigi
- 8 En vino - Movas sin kiel akvo en vento - Far'
- 9 Ĉefo ĉe fervojo
- 10 Faris ledon - Longa temp'

Vertikale

- A En sako - Instruist'
- B Estos ofte nesperta parolanto
- C Heroo en dramo de Ŝekspiro - Membr'
- Ĉ Mevon - Klub' -
- D Sufikso kiu indikas profesion - Havis en la manoj
- E Flage
- F Fluas
- G Rilate al juna muzikanto
- Ĝ Stabo
- H Ej' - Faron

Lennart Persson

REBUSO



(solvo en sekvonta numero)

SOLVO DE 97/4

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	A	L	T	E	R	N	A	T	I	V
2	K	I	R	K	O	S	E	L	O	
3	V	E	U	S	S	T	R	A	T	
4	O	N	D	I	S	R	A	R	A	
5	F	O	D	E	P	O	N	O	S	
6	O	N	D	A	R	O	N	K		
7	N	A	S	P	R	A		A		
8	T	O	N		E	U	R	O	P	
9	O	R	D	O	N	A	T	A	T	
10	N	I	A		E	N	E	S	T	I

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

Extra
nummer

Kallese till årsstämma i

Esperanto-Gården

i Lesjöfors ek för

Voko al jarkunsido en

Esperanto-Gården

i Lesjöfors ek för



Lördagen

den 4 oktober 1997

kl 14.00

Sabate

la 4-an de oktobro 1997

je la 14.00h

för bokning av rum kontakta

Esperanto-Gården

Tel 0590-30909

Fax 0590-30309

por mendi ĉambroj kontaktu

Esperanto-Gården

Tel +46-590-30909


Fakso+46-590-30309

OBSERVERA! ATENTU!

Esperanto-Gården

Detta är det korrekta sättet att skriva namnet enligt styrelsebeslut.

Tiamaniere oni korekte skribas la ñomon laŭ decido de la estraro.



**1000 foje 1000
Ni fariĝos milionuloj!**

Jngemar Nordin kaj Kaisa Hansen decidis, ke antaŭ la fino de la jaro 1000 esperantistoj estos donintaj po 1000 kronojn. Tiam ni havos milionon por Esperanto-Gården.

Vi partoprenu, ĉu?!

**1000 gånger 1000
Vi blir miljonärer!**

Jngemar Nordin och Kaisa Hansen har bestämt att innan året är slut så har 1000 esperantister gett 1000 kr var. Då har vi fått ihop en miljon till Esperanto-Gården.

Du är väl med?!

Ĝis la 30a de junio:

Tiom da vizitantoj!

526 gastnoktoj

el kiuj 202 gastoj

el kiuj 88 apartenis

al 3 grupoj

sekve 120 individuaj vizitantoj!

Fram till den 30 juni:

Så här många besökare!

526 gästrätter

varav 202 gäster

varav 88 ingick

i 3 grupper

alltså 120 enskilda besökare!



Vill Du göra ett
dagsverke före
och/eller efter
årsstämman?

Ĉu vi volas
taglabori antaŭ
kaj/aŭ post la
jarkunsido?

Kontaktu Lennart Svensson

Tel +46-(0)590-30909

Svenska Esperantoförbundet
Vikingagatan 24, S-113 42, SVEDIO

B Förenings
Post


Malmö Esperantoförening
Kronetorpsgatan 94
212 27 Malmö



Jack till



Dankon al

Alla som hjälpt till bl a:

Lennart Svensson
Ros-Mari Refai
Carl-Erik Ohlsson
Gunnar Olsson
Ole Hansen
Bengt Nordlöf
Märtha Andreasson
Margareta Andersson
Majken Svensson
Melitta Dörr
Roger Nordlund
Anita Dagmarsdotter
Kaj Stridell
Stig Sandberg
Sven Linnér
Ingrid Ottosson

Hans Dahl
Hamid Refai
Wim Posthuma
Sten Broman
Kaisa Hansen
Harald Andersson
Lars Forsman
Karl Rönnerberg
Åke Magnusson
Barbro Carlsson
Carl Elofsson
Ketty Sundin
Cornelia Lindkvist
Gudrun Nerpin
Ulla Linnér
Karl-Gustaf Gustavsson

och alla ni andra som hjälpt till på olika sätt.
Ingen glömd - även om inte nämnd!



Tack också till:

**Qvarnström LH Display
Lesjöfors plast
Projekt Lesjöfors 2000**